

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 9;

VKEA
★
1984

decembro, 1985.

Togolando;

paca lando koninda.

Sub la nomo, Togolando, estas rekonata tiu teritorio en okcidenta Afriko, kiu en pli frua tempo estis sub la protekto de la malnova Germanio, sekve de interkonsento farita en 1884 inter la tiama vilaĝestro de Togoville, (pr.: togovil), kaj reprezentanto de la registaro de Germanio. La nuna Togolando estas, tamen, malpli ol la duono de la teritorio de tiu tempo, pro artikolo kiu estis sekvo de la unua mondmilito; kun enloĝantaro de malpli ol du milionoj, ĝi estas longa, mallarĝa 'fingro' de lando, troviĝante inter Gano kaj Benino. La ĉefurbo, Lomeo, situas ĝuste ĉe la landlimo inter Togolando kaj Gano, sed ankaŭ ĝuste ĉe la marbordo.

Norde de Lomeo, la lando etendiĝas kiel serio de ebenaĵoj, drenitaj de unu grava kaj kvar malpli gravaj riveroj; la plej alta loko estas monto nomita Agou, (pr.: agu), kies alteco estas 986 metroj, kaj la pli granda el la du ĉefaj lagoj, nomita Lago Lak Togo, etendiĝas ĝis kvindek kvadrataj kilometroj. En la plej norda parto de la lando, la klimato estas tipe tropike pluva, dum en la mezo kaj pli sude, la klimato estas pli ekvatora kaj malpli pluva; la marborda regiono spertas malmulte da pluvo, kaj estas preskaŭ sen densaj arbaroj.

La ĉefa elemento en la ekonomia vivo de Togolando, agrokulturado, estas grave influata de tiuj klimat-aj diferencoj. En iuj regionoj, la problemo estas troo da akvo, dum en aliaj senteblas grava manko de ĝi. Per kombino de drenado kaj irigaciado oni provas trovisolvon de tiuj problemoj, sed dume la rikoltoj

estas malpli ol kontentigaj. Ĉie la temperaturo estas favora al terkultivado, kaj la tero mem konsistas el argilecaj specoj kiuj mem estas facile prilaborataj kaj favoraj por diversaj specoj de kultiveblaj vegetaĵoj. Al la tradiciaj rikoltaĵoj de rizokaj sukerkano, aldoniĝas la diversloke trovataj rikoltoj de maizo, milio, ignamo, manioko, fazeoloj kaj aliaj nutraĵoj. Agrokulturado donas ankaŭ la du ĉefaj eksportaĵoj de la lando: kakao kaj kafo. Estas rekonata, tamen, ke bremsa faktoro restas ankoraŭ la relativa malmmoderneco de la uzataj teknikoj kaj metodoj; grava atento estas donata al plioftigo de la uzado de taŭgaj ekipaĵoj kaj teknikoj.

Relative lastatempe oni komencis doni ĝeneralan atenton al sistema bestbredado kiel fonto de nutraĵo, sed jam la rezultoj estas konsiderindaj; oni altiras atenton aparte al la bredado de kokoj kaj anasoj, ĉie en la lando.

Tradicie, la togolandanoj praktikas fiŝkaptadon, kaj en la maro kaj en la riveroj kaj lagoj, kaj lastatempe ankaŭ en tiu kampo oni raportas disvolviĝon. Aparta atento estas donata al plibonigo de la teknikoj de konservado per sekigado kaj similaj metodoj.

Ekonomie, la kultivado de arbaroj estas grava por Togolando. Ĉefe en la montaj regionoj, oni kultivas diversajn specojn de ligno-arboj por eksporto, sed oleoj el palmnuksoj kaj kokosnuksoj grave rolas en la ekonomio, aparte por produktado de sapo. Por subteni tiun industrion, oni dediĉas kapitalon por plibonigo de la enlandaj transporteblecoj.

Togolando suferas pro relativa manko de energifontoj. Elektra energio estas enportada el la najbara lando de Gano, kaj ĉiuj bezonoj de petrolo kaj benzino devas esti kontentigitaj per enportado de nafto kaj ercoj diversaj. Hidroelektraj centraloj estas konstruataj, kunlabore kun najbara Benino, kaj rafinejo por petrolo jam funkcias.

Kiel ĉiuj aliaj evoluantaj landoj, Togolando troviĝas ankoraŭ en la komenca etapo de industria evoluo. La ekzistantaj industrioj ne sufiĉas por la bezonoj, sed adekvata kapitalo por plibonigado de la situacio estas malfacile akirebla. Ligita problemo estas tiu de relativa manko de teknikistoj kaj trejnitaj laboristoj. Krome, la transportebleco en la lando ankoraŭ havas mankojn, kvankam tiu ĉi problemo jam dum pluraj jaroj ricevas urĝan atenton kaj iom post iom plikontentiĝas.

Helpo en la formo de pruntoj de kapitalo venas de aliaj landoj, sed la kosto pro rentoj, ktp, estas grava afero por tiu ĉi relative malgranda lando. La bezonoj por pli da teknikistoj kaj trejnitaj laboristoj ricevas urĝan atenton, kaj jam estas survoje al vera solvo per kreo de taŭgaj altgradaj kaj teknikaj lernejoj. La registaro establis apartan instancon por pristudi la bezonojn de kapitalo kaj aliaj rimedoj, kaj per tio komencas koni kaj fronti la problemojn solvendajn.

El la turista vidpunkto, oni fanfaronas, ke la tuta lando estas vizitinda, pro apartaj karakterizaĵoj de la diversaj regionoj. Ĉie oni facile disponas pri restado en hotelo, eĉ en la malgrandaj urboj kaj vilaĝoj. Ĉie oni povas veturi per vojoj taŭgaj por la bezonoj, per vagonaro al la ĉefaj urboj aŭ per aviadilo al diversaj surteriglokoj apude al la ĉefaj urboj. Aparte en la tiel-nomata mara regiono, en la sudo de la lando, veturado per aŭtomobilo estas ĉie tute sen malfacilaĵoj. La ĉirkaŭaĵo de la ĉefurbo, Lomeo, estas fama pro belaj plaĝoj, apud la Golfo de Gineo, por tiuj, kiuj volas simple ripozi sub la suno en la apudeco de komforta hotelo.

Iom enlande, apude al Lago Lak Togo, troviĝas ĉio por tiuj, kiuj

volas ĝui libertempon plene de ekzercadeblecoj, ĉu en velŝipo sur la lago, ĉu per malkovro de histoririĉa ĉirkaŭaĵo. Pli norde, troviĝas eblecoj por bestĉasado sufiĉaj por kontentigi la plej spertan entuziasmulon por tia sporto. Kaj ĉio estas facile atingebla el Lomeo !

Togolando estas vizitinda iam ajn, kvankam la rekomendo estas por la periodo, oktobro ĝis aprilo, kiam la vetero estas la plej bona. Oni promesas al ĉiu vizitanto ferion senrivale bona, sen malfacilaĵoj en pacema, akceptema lando kun apartaj vidindaĵoj.

Koffi Gbeglo

(adaptita de LM el originalaĵo.)

----- -oo- -----

Recenzo.

Esperanto en la Viena Radio, Karl Beckmann. Vieno: Esperanto-Redakcio de ORF, 1985. 34 paĝoj, 30cm., broŝurita; ilustrita. Ne en la librokomerco.

Jen modesta kunmeto de, ĉefe, respondoj al demandoj pri la oficiala pozicio de la Redakcio, pri programfarado, pri agadmanieroj ĝenerale kaj pri la personaro de la Redakcio. Estas evidente, ke la kunordigo de eĉ la modesta kvaronhora elsendo ĉiusemajne postulas multe pli da dediĉita kaj iaciga laboro, ol ŝajnas al ni, kiuj nur aŭskultas la rezultojn.

La tuto, tamen, estas verkita en nepretendemaj vortoj, evidente celantaj doni informojn kaj menciante la problemojn nur por kompletigi la bildon. Ankaŭ la stilo de la verko estas nepretendema; la vortoj, senescepte komunlingvaj, fluas en intereskapta stilo, tiel ke leganto kvazaŭ aŭdas ilin dum partopreno en konversacia rondo. Konversacia rondo kiu serĉas materialon trovus abundajn ideojn tie ĉi!

Se unu konkludon oni devas preni el la tuto, ĝi estas tio, ke la ekzistokialo por tiu Redakcio estas komuniki al Esperantistoj, kaj ke sekve la ekzistorajto daŭros tiel longe kiel evidentiĝas, ke la Redakcio plenumas tiun servon. Ekz-

daŭrigo je paĝo ses

INTERKONATIĜO

Kun plezuro ni bonvenigas du novajn membrojn al nia (ankoraŭ) modesta membro-listo.

Membro-listo je 1985 - 12 - 15.

33. Seesink, S-ro P., ensemblisto; publicisto;
Lariksstraat 22, 3329 AK Dordrecht, Nederlando;
34. Pachter, Ing. J.A., gvidanto de forstmastrumada arbardistrikto;
Zum Kreuzbühl 16, 7480 Sigmaringen-Jungnau, Okc. Germanio.

Kiel kutime, ni petas averton pri iu eraro en publikigitaj detaloj.

Pri ambaŭ novaj membroj ni notu kun ĝojo, ke la profesiaj kampoj estas novaj por nia Membro-listo.

La nomo de S-ro Seesink estas konata jam al legantoj de niaj Novaĵ-leteroj, ĉar estis li kiu antaŭ iom da tempo petis helpon dum preparo de artikolo por revuo MONATO. La artikolo siatenpe aperis, kun interesvekaj ilustraĵoj, kaj nia nova Membro jam komencis laboron super estontaj artikoloj.

Ingeniero Pachter aliĝas al ni pro rekomendo de nia Estrarano en Italio, kaj sendube ankaŭ de li ni legos interesvekajn vortojn pri kampo kiu lastatempe, kaj tute meritite, kaptas vastan atenton.

Ni notu, tamen, ke nia membro-listo ankoraŭ estas modesta, pensante pri internacia organizaĵo dediĉita al plibonigo de interkomunikado en la gravaj kampoj de komerco kaj ekonomio. Certe pli da Esperantistoj staras pretaj aliĝi, se aŭ ili aŭ ni povas trovi solvon por la problemo de financa subtenado por niaj laboroj. Ke ni povas doni al ili ŝancon iel esti konataj, ekzemple per la ĉi-foja ĉefartikolo, estas kontribuo kiun ni volonte faras kaj faros, dumlonge ke ni ĝuas la subtenon de tiuj Membroj, kiuj ne spertas la saman problemon.

Ni kaptas la okazon atentigi niajn Membrojn pri la ebleco senpage aperigi anonceton pri si mem, aŭ malmultekoste aperigi anonceton pri la koncerna entrepreno, cele al vera interkonatiĝo, aparte pri livereblecoj de varoj aŭ servoj. Tiu nia dediĉo de duonpaĝo al reklamanoncoj ŝuldiĝas ĉefe al propono de D-ro Picasso, kiu estas la ununura Membro peti aperigon de vere 'komerca' reklamo, ĝis nun. Se aliaj Membroj ne pretas aprobi tian uzadon de spaco en niaj paĝoj, tiam tiuj Membroj tiel avertu nin, kaj proponu pli valoran uzadon de la spaco.

Intertempe, ni povas nur peti vian aktivan helpon utiligi la spacon laŭeble. Nia legantaro ne estas vasta ankoraŭ, sed ĝi estas eble la ununura legantaro tiel fakte kunligita per la internacia lingvo.

Kaj ni memorigas pri niaj bonaj rilatoj kun revuo MONATO, revuo kiu pretas aperigi 'komercajn' reklamanoncojn sed kiu havas multe pli grandan legantaron ol ni. Lastatempe, MONATO anoncis, ke la abonantaro ŝvebas ĉirkaŭ du mil pagintoj, kun signifo, ke la legantaro estas konsiderinde pli granda ol tio. Al nia Fakgrupo, la eldonisto de MONATO konfirmis sian pretecon elpigi kurtaĝon je 15 procento de la mendo-sumo al iu varbinto de reklamanonco pro entrepreno ne mem la varbinto. Se la varbinto tion petus samtempe kun transdono de la mendo, la eldonisto pretas fari la elpagon rekte al la kazo de IKEF.

Tiajn enspezojn la Fakgrupo ricevas, kompreneble, kun ĝojo, sed ni volas emfazi la gravecon de la akiro de la mendoj, aparte el ekster la E.-Movado, pli ol la dezirindecon de enspejoj por nio kaso. Kaj ni ne forgesu tion ĉi, ke la tuta E.-gazetaro serĉas reklamanoncojn, kaj ke foje anonco aŭ anonceto en loka gazeto pli taugas por entrepreno kiel komerco estas ĉefe loka afero.

Interŝanĝo de ideoj.

Dankplene ni kvitancas ricevon de aldonaĵoj al nia biblioteko.

Kiel periodaĵoj venis: l'Esperanto, el Italio; Informilo por Interlingvistoj, de CED de UEA; La Verda Ĉenero, el Francio, kaj La Espero, el Suda-Koreio. Kiel foja komunikaĵo venis kaj la broŝuro de Radio Vieno, al kiu ni aludas je alia paĝo, kaj formala komuniko pri la starigo, sub la ŭlega aprobo de la sanmarina parlamento, de la Akademio internacia de la sciencoj, San Marino.

Tiu lasta informas pri la necesaj preparlaboroj por ke la Akademio plene funkciu ekde januaro proksima, kaj invitas kunlaboron de 'kunlaborpretaj sciencistoj el la tuta mondo'. Ni pretas transdoni detalojn al interesitoj.

Por nia Fakgrupo, tiu laste ricevita kajero de 'La Espero el Koruejo' estas aparte interesa, pro la fakto, ke en ĝi aperas grava artikolo pri la disvolviĝo de la politiko pri eksterlanda investado en tiu lando. La en ĝi priskribita "Malferma politiko de komerco" reprezentas, (ŝajnas al via Ĝenerala-Sekretario), grandega antaŭa paŝo flanke de lando kiu lastatempe plurfoje montris jam altan nivelon de kompreno de la riskoj entenataj, sed samtempe la rikoltoj sperteblaj en sana fronto al la plej modernaj aspektoj de internacia komerco.

Prefere ol elekti citaĵojn el la artikolo, ni invitas interesitojn peti ekzempleron de ni, (ni ricevis plurajn), kaj studi la tutan artikolon.

La periodaĵo, La Verda Ĉenero, venis al ni prosprono de nia agema Estrarano en Francio, S-ro F.-X. Gilbert, kaj en ĝi aperas represo de nia komuniko al la E.-Gazetaro, post la Fondkunveno. De S-ro Gilbert venis alia skribaĵo, ankaŭ bonvena! La Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc, de kiu nia membro estas Direktoro, entreprenos baldaŭ represon de la oficiala broŝuro pri la komerceblecoj en la regiono, kaj ni ricevis peton kontroli, kaj kie necese traduki, la liston de terminoj pri metioj kaj industrioj troviĝantaj tie. Ni plenumis la

taskon kaj ricevis, kaj peton prezenti fakturon pro la laboro, kaj peton permesi aludon al IKEF dum kunmeto de la broŝuro. Ni, kompreneble, jese respondis; la enspozo por la Fakgrupo estas tre bonvena! kaj iu tia renomo ne povas ne esti helpa por nia agadplano.

Ne-rette ni ricevis proponon fari aludojn al ekspozicioj en kiuj niaj membroj eble partoprenos, en la formo de 'kalendaro' kun datoj kaj detaloj; de S-ro Welling, nia membro en Hoheneggelsen, Okcidenta Germanio, ni ricevis informon, ke li intencas partopreni en foiro Hannover, kiel ekspozicianto de radio-sendriceviloj kaj sendrataj telefonaparatoj. Ni, do, kunmetis reklamanoncon pri tiu lasta, kaj invitas niajn membrojn nepre faru kontakton kun S-ro Welling, (ĉe entrepreno Kolbe kaj Kompanio), dum eventuala ĉeesto en la foiro, kaj anoncu al ni iujn intencojn partopreni en aliaj foiroj, kun detaloj pri ekspoziciaĵoj. Se la reagoj estas pozitivaj, ni povus aperigi regulan rubrikon tian. Legantoj sendube jam rimarkis la aperigon de reklamanonco pri la Foiro en Ankono en Italio, proksimjare en junio.

Ni ricevis klaran proponon starigi rubrikon kun la titolo, Vizitaĵoj, cele al vera interkonatiĝo de niaj membroj, ĉefe la aŭtoroj de artikoloj en niaj paĝoj. Bezonos tempon ankoraŭ elpensi taŭgan prezentmanieron, sed baze la ideo estas aldoni mallongan biografian noton pri la aŭtoro, apude al iu artikolo. Al ni, la ideo ŝajnas esbona, kaj ni invitas reagojn de aliaj membroj. La plej malnovaj membroj inter ni eble memoras la biografiajn notojn kiujn ni kunmetis pri la Prezidanto kaj Sekretario, por nia plej unua Laŭokaza Novaĵletero!

Kampo en kiu ni ne ricevis proponojn, lastatempe, estas tiu de la terminologia laboro, kiu staras je la supro de nia agadplano. Ni havas ankoraŭ nur du proponojn de kunlaboro, sed la kampo postulas pli ĝeneralan subtenon ol tio, kaj ni ankoraŭ ne ricevis sinproponon de kunordigonto por la laboro.

Provizore, ni pretas konservi

proponojn de terminoj, tie ĉi en la arkivo de la Fakgrupo, sed ni volas emfazi la provizorecon de tiu propono, kaj peti seriozan konsideron flanke de niaj membroj.

Lastatempe en Nederlando eldoniĝis nova kunmeto de la Statuto kaj Regularo de la ĝis-nuna Poŝtĉekin-stanco, kiu ekde januaro estos la Popola Poŝtbanko; en tiu kaj en similaj publikigaĵoj oficialaj en aliaj landoj troviĝas riĉa kampo en kiu 'floras' esprimoj ne ĝis nun tradukitaj. La taskaro kunordigi terminologian taskaron por ni certe estos iom streĉa, sed certe kontingenta, laboro por entuziasmo. Finfine eldonado de nove fakterminaro certe estos grava evento ne nur por ni sed ankaŭ por la E.-Movado generale.

Kaj finfine ni denove konstata, ke al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj!

lm

-oo-

Via Ĝenerala Sekretario

varme dankas pro la tre afablaj salutmesaĝoj ricevitaĵoj okaze de la jarŝanĝfestotagoj.

Reciprokajn salutojn ni sendas al ĉiuj legantoj, volontaj por vi sukceson en ĉio entreprenota dum la jaro proksima.

-oo-

Lindato por la proksima Novaĵletero estos la 15-a de februaro, tie ĉi en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro L. Mee.

-oo-

Lastatempa novaĵero!

Ŝajne ni sukcesis vendi nian negativan kapitalon! Pago estas survoje, laŭ letero ĵus ricevita.

I K E F n u v i ĝ i s !

ADMINISTRADO

La Estraro perletere diskutas jam la aranĝojn bezonatajn por starigi Jarkunvenon de la Fakgrupo dum 1986; konforme al la sinteno esprimita en la Statuto, la komencpunkto estas pripensado de ĉu aŭ ne la Universala Kongreso en Pekino estos taŭga okazo por tiu Jarkunveno. Urĝe necesa jam nun estas takso pri ebla partopreno en la pekina kongreso.

Ĉiu Membro de IKEF kiu havas la esperon tien iri, kaj pro tio povus ĉeesti kunvenon de la Fakgrupo en la kadro de la kongreso, estas petata sciigi al ni tiun intencon.

Eble egale grave, ĉiu Membro kiu jam rezignis pri la ebleco iri al Pekino, donus gravan helpon al la Estraro per sciigo de la fakto.

Simpla sciigo per poŝtkarto sufiĉus! Anticipan dankon!

Ĉu aŭ ne ni starigos jarkunvenon en la kadro de Universala Kongreso, nia Statuto devigas la Estraron prezenti al la membraro raporton pri la eventoj de la jaro, cele al akiro de formala aprobo de tia raporto; kompilado de la raporto rilate al 1985 komenciĝis jam. Laŭ la sama Statuto, la membraro rajtas elekti ankoraŭ du membrojn de la Estraro, el sia propra konsisto, kaj kvankam plena tempo restas ankoraŭ, la nuna Estraro petas pripensadon de la eblecoj. Se iu Membro volas proponi nomon de alia Membro por esti kandidato, aŭ se iu Membro pretas akcepti nomigon se alia Membro tion proponus, ni petas kiel-eble-plej-baldaŭan sciigon pri ankaŭ tiu fakto.

Je alia paĝo ni raportas la mankon, ankoraŭ, de sufiĉaj sinproponoj por la terminologia laboro, kiu estas grava por nia estonteco; ankaŭ pri tio ni petas vian atenton kaj vian kunlaboron.

En la nomo de la Estraro:

Lawrence Mee,
Ĝenerala Sekretario.

daŭrigo el paĝo du

istas nur unu maniero pruvi tiun plenumon, kaj tio estas la daŭra ricevo de reagoj de aŭdantoj. Kiam S-ro Vokal diras, fine de laŭtleĝo de la nomoj de tiuj, kiuj dum la pasintaj sep tagoj sendis komunikon al la Redakcio: "Skribu al ni!", li tion faras nur ĉar li scias ĝuste kiel la daŭrigo de la servo dependas je tiaj reagoj.

Ni tie ĉi volonte aldonas nian konsilon: skribu al: Esperanto-Redakcio de ORF, Postfack 700, 1041 Wien, Aŭstrio; pli bone, unue aŭdu la elsendon, (je 0540 h. aŭ 0945 h. dimanĉe per 6000 aŭ 6155 kHz), kaj poste faru veran reagon!

Lawrence Mee

----- -00- -----
Represo

(el l'Esperanto, 9/10: 1985.)

Sancoj de Esperanto sojle
de la centjara jubileo.

Lastatempe impresis min, kiel vangofraĝo, la informo ke niaj regantoj dekretis la enkondukon de la angla lingvo en niajn elementajn lernejojn.

Tia decido ŝajnas al mi malutila kaj danĝera eraro laŭ ĉiuj vidpunktoj, ĉar ĝi estas plua senutila ĵetado de tempo kaj mono, kaj kontribuas al progresanta kulturkoloniado kiu nin hontigas kaj, iom post iom, nin forigas el nia natura eŭropa alvokiĝo.

Laŭ mia opinio, la tuta Esperantistaro devus reagi kun grandega energio, kriante al tuta Eŭropo iujn veraĵojn, kiujn la kleruloj mem ofte ne-scias aŭ forgesas.

Unua argumento: lingvo kiun ni volas funkciigi kiel internacia komunikilo, devas esti neŭtrala. Neniu nacia lingvo estas neŭtrala, kaj Eŭropo, kies plejmulto parolas novlatinajn lingvojn, neniam povos akcepti la anglan en tia rolo.

Dua argumento: internacia lingvo ne anstataŭas la naciajn lingvojn kaj dialektojn. Ĝi plenumas helpeman funkcion, kaj devas servi ne plentempe sed sporade, nur kiam diverslingvuloj bezonas paroli aŭ korespondi. Tial, ĝi devas esti

facile lernebla, facile uzebla facile memorebla.

Nek la angla, nek la aliaj naciaj lingvoj, posedas tian facilecon, kaj tion ĉi bone konas ĉiuj kiuj, post multaj longaj jaroj de lerneja studado, frustracie malkovras nescii lingvon por kiu ili senutile ĵetis tiom da tempo kaj da mono.

Esperanto, kontraŭe, estas facila pro sia logika strukturo, pro sia klara prononco, pro sia limigita radikaro. Nur Esperanto, do taŭgas kiel eŭropa komunikilo.

Tria argumento: Esperanto estas lernebla, ankaŭ aŭtodidakte kaj dum libertempo, sen multekostaj lecionoj aŭ eksterlandrestadoj. Tial ĝi estas ne nur interpopola, sed ankaŭ populara komunikilo.

Kvara argumento: Esperanto estas realaĵo viva kaj vivipova, alt-nivele perfektigita kaj elproviita dum la unuaj jarcento de sia ekzistado. Tial ĝi bone taŭgas por sia rolo, nek bezonas pluan perfektigadon.

Kvina argumento: ĉiuj kiuj ankoraŭ ne konas la antaŭdiritajn veraĵojn, kiujn la Esperantistoj pritraktis kaj klarigis dum unu jarcento per dekoj da kongresoj kaj altvaloraj verkoj, nescias pro sia kultura pigreco, ne pro manko de informiloj, kiuj, kontraŭe, estas abundaj kaj altnivelaj. Tion ĉi ni Esperantistoj devas krei al tuta Eŭropo, ĉiuj kune kaj laŭtvoĉe ĉar la nuna mondo ne aŭdas suspiradon.

Kaj al nia ĥoro devas unuiĝi la voĉoj de ĉiuj naciaj, internaciaj, lokaj, fakaj Esperantistaj organizaĵoj, kaj tiuj de ĉiu Esperantista gazeto, revuo, ĵurnalo, ktp. Ĉi tiu ne tiom gravas esti, kiom ŝajnas milionoj.

Ni devas ĉesi babili en nefermita rondo. Ni devas arogi: emfazi, provoki, ataki, fanfaroni; sed ni devas fortreni Eŭropon maldekore kovri nian ekzistadon kaj ekkoni ĝin gravecon de niaj proponoj.

Ne timigu nin skandaloj aŭ polemikoj, kiujn eĉ ni devas serĉi: ĉar ju pli bruanta nia afero, des pli atingebla nia celo.

La hodiaŭa situacio estas favora al la Esperanto-Movado, ĉar:

- i. Eŭropo urĝe bezonas sian komunikilon;
- ii. dum la nuna krizo de idealoj la tuta homaro, kaj surtute la gejunuloj, serĉas ion kion forte similas la Zamenhofa ' interna ideo ';
- iii. en Romo reĝas, kaj batalas por la paco, granda pola Papo, kiu ne povos resti surda al la paciga voĉo de sia genia samlandano;
- iv. en 1987, oni celebros la centjaran jubileon de Esperanto.

Do, aŭ la Esperantistaro kapablos bone uzi la okazon, aŭ ĝi estos perdinta sian grandan rendevuon kun la Historio.

Riccardo dell'Aquila
Benevento; junio, 1985.

----- -oo- -----
El letero ricevita
de membro-kandidato :
Optimismo ne sufiĉas!

Mi tralegis la varbfolion, kiun vi sendis al mi, kaj volas nun diri, ke ĝi estas plena kun belaj optimismaj ideoj. Tio plaĉas al mi, sed mi volas peti vian atenton al tiu ĉimia opinio: se Ni volas, ke nia Esperanto entute sukcesu, Ni devas uzi ĝin je tia maniero, kiel oni uzas vivajn naciajn lingvojn. Sekve, oni devas ĝin eluzi en ĉiuj taloj de la homa vivo: en edukado, politiko, kulturo, ekonomia negocado, sporto, turismo, resanigado, kaj tiel plu. Al ĉiuj homoj ni devas doni ŝancon uzi la lingvon kiun ni propagandas.

Je libertempo, mi okupiĝas pri arto, literaturo kaj naturo; mi desegnas, pentras, skulptas, projektas; mi foje konkuras je naciaj kulturaj manifestacioj kaj foje ankaŭ en internaciaj okazaĵoj. Por mi gravas, ke en ĉiuj el tiuj kampoj mi povas fari ion por popularigo de nia internacia lingvo, sed mi renkontas bremsajn faktorojn. Ŝajnas al mi necese provizi poŝformatan E.-vortaron kun bildoj por

klarigi la vortojn, kaj pluraj amikoj kuraĝigas min en tio.

Sed la necesa preparinvesto estas troa por individuo.

Io pli konkreta ol optimismo estas bezonata por popularigi nian genian eltrovaĵon!

Tomislav Radisavljević.
Niš; aŭgusto, 1985.

Noto de la redaktoro:
Reagoj de niaj membroj estos bonvenigataj.

----- -oo- -----

paĝo ok

REKLAMANONCOJ

REKLAMANONCOJ

REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj ses linioj, inkl.
de la unuaj ses linioj.
Ĉiam umoŝpe mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj kvin milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de kvin
irpk-oj.

Ĉiam antaŭpagita.

Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

Foiro CEBIT pri komunikado
kaj komputorado: Hannover,
1986-03-12 ĝis 1986-03-19
Vizitu la standon de
Kolbe kaj Kompanio, (Membro
de IKEF: S-ro H. Welling.)

La Baza Kurso en Esperanto,
de Audrey Childs-Mee;
la plejefika metodo instrui
kursanaron. Eldoninto:
Mondk. Eld. Esperantista,
P.O.Kesto 25041, Rotterdam.

Reklami estas informi;
ju pli vi informas,
des pli vi vendas.
Uzu la senkoston servon de
via propra komunikilo:
La Laŭokaza Novaĵletero.

Tiu
ĉi
spaco
estas
rezervita
por vi!

Reklami estas informi;
ju pli vi informas,
des pli vi vendas.
COMUNICAZIONE IMMAGINE
teknikaj broŝuroj, reklam-
anoncoj, en iu ajn lingvo.
via De Gasperi 7,
20057 VEDANO (MI), Italio.

Mondkomerca
Eldonejo
Esperantista
por ĉiu speco de oficeja
bezonaĵo en la internacia
lingvo.
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Ned.
Membro de IKEF.

Pri pagoj al ni.

IKEF ĝis nun ne havas apartan bankril-
aton, sed utiligas por ĉiuj financaj trak-
taĵoj konton en la kontaro de Mondkomerca
Eldonejo Esperantista, ĉe la adreso:

P.O. Kesto (Postbus) 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Tiu Eldonejo tenas poŝtĉekkonton, numero
361 47 95 ĉe la nederlanda Poŝtbanko,
(antaŭe: nederlanda poŝtĉekinstanco).

Membroj de IKEF pagas jarkotizon de
dudek guldenoj, por la kalendara jaro.

Cele al relativa malaltigo de kostoj
kaj laboroj, ni ĉiam konsilas al pago por
kelkaj jaroj en anticipo. Anticipa pago
por dudek jaroj aŭtomate provizas membr-
econ dumvivan.

Loĝantoj en landoj sen pagomalfacilaĵoj
kutime povas aĉeti internacian poŝtmand-
aton ĉe la poŝtoŝicejo, kaj tiel sperti
la plej malmultekostan metodon fari trans-
pagon. Adresu tian internacian poŝtman-
daton al la Eldonejo, kun mesaĝo: 'por
IKEF'.

Se vi, loĝanto en tia lando, tenas mem

konton ĉe la poŝtĉekinstanco en via lando,
vi povas fari transpagon tra tiu poŝtĉek-
instanco. Faru informpeton mem ĉe la
poŝtoŝicejo, sed memoru, ni petas, ke tia
pago bezonas ĝis du semajnoj por atingi
nian konton.

Foje oni volas fari pagon per uzado de
internaciaj respondkuponoj. Tio estas
relative multekosta metodo, sed foje ĝi
plej efika. La kosto de jarkotizo estas
dudek tri irpk-oj.

Alia praktika metodo estas la aĉeto de
monbileto(j) nederlanda(j), kaj ilin sendi
al ni per registrita poŝto. Iu restanta
sumo post enkasigo estos konservita por vi
en persona konto.

Alia tre kosta metodo estas la uzado de
persona ĉeko via, al la persona nomo de
S-ro L. Mee, kaj kun la aldono de sep kaj
duono guldenoj por kovri la ne-eviteblajn
enkasigokostojn.

Lasta ebleco estas fari pagon tra Univ-
ersala Esperanto-Asocio, ankaŭ en Roter-
damo. Faru mencion de la nomo, Intern.
Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kaj UEA
aŭtomate elpagos la sumon al ni.